

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

La naŭa Azia-Oceania Kongreso de Esperanto

Mizro Iwaya

La 9a AOK okazis de la 25-a ĝis la 28-a de aprilo 2019 en Da Nang, Vjetnamio, kun 281 aliĝintoj el 22 landoj (laŭ la retejo Webdaily, Koreio). La nombro estas iom malgranda, sed la etoso estis sufiĉe internacia pro la diverseco de nacieco. Pri tiu kongreso, mi volas mencii ĉi tie tri ĉefajn eventojn.

1. Inaŭguro

Da Nang estas relative malgranda urbo kun loĝantaro de 1 miliono kaj 215 mil. Do eble ĉi-kongreso estas relative granda evento ĉi tie. La loka registaro subtenis nin. Pendis granda bendo super la enirejoj de la kongresejo kaj apudaj hoteloj. Dum la malfermo salutis lokaj gravuloj kaj tion kamerais profesiaj ĵurnalistoj kvazaŭ oficialan eventon. Do la etoso estis grandioza simile al UK.

En ĝi s-ino Doi Ĉieko kaj s-ro Inumaru Fumio

estis honoritaj per “Memormedalo por paco kaj amikeco inter popoloj” kune kun aliaj esperantistoj. S-ro Suzuki Keiĉiro salutis en la nomo de japana esperantistaro. (foto)

2. Nacia Vespero

Nacia vespero estas ofte bona distingomarko por juĝi la gravecon de festevento en tiu lando. Laŭ mia sperto la plej pompa estis en la 94a UK en Pekino, 2004, kaj eble ankaŭ 5a AK en Bengaluro, 2008. Male eŭropaj landoj ne prezentas pompan spektaklon.

Nu mi volas diri ke tiu ĉi en Danang estas same grandioza spektaklo, sufiĉe kontentiga. Aperis naciaj dancoj, kantoj, muzikbandoj k.t.p. Fakte mi ne bone komprenis la enhavon de la prezentaĵoj, sed ni povis konstati altan kvaliton per simpla spektado.



3. Ekskursoj

Mi partoprenis en du ekskursoj: D1-ekskurso al Hoi-Ano kaj la tuttaga urba ekskurso. Ambaŭ estis bone aranĝitaj. Ŝajnas al mi ke turisma entrepreno estas grava ekonomia elemento por Vjetnamio kaj pro tio ĝia kondiĉo estas bone ordigita. Precipe la rivero Tobon sur "ronda boato" en la unua ekskurso, kaj "la templo de granda Avalokiteŝvaro" en la dua ekskurso estis sufiĉe ĝuidaj.

Mi vidis ke junaj esperantist(in)oj vigle agadis en la kongreso. Precipe "hanoja kvaropo" montris sin en ĉiu angulo de la kongreso. Inter ili f-ino Tran Thi Hoan (Ĝojo) tiris mian atenton per sia rimarkinda aktiveco. Tio estas nature komprenebla ĉar ŝi estas prezidanto de TEJO, kaj samtempe ĉefa membro de LKK.

Mi devas aldoni ke la lando mem estas sufiĉe ekzotika kaj mistera. Do mi povis ĝui ĉiun parton de Vjetnamio. Mi ĝuis ankaŭ malaltan varprezon ĉi tie. Mi povis facile kaj agrable loĝi ĉi tie.



([KK]=nia kutima kunvenejo, nome Kanagawa-Kenmin-Sentaa, proksime de la Stacidomo Jokohama)

Okazis

*maj. 18 [KK] Hama-Ronda Vespero

S-ro Sasaki Teruhiro parolis pri la lastatempa situacio de Esperanto-movado en Ĉinio. Li restis kelkajn jarojn en Ĉinio, instruante kaj la japanan kaj Esperanton.

Niaj Planoj

*jul. 27[KK] Komuna Klaso

Oni havos komunan klason (ĉar kelkaj el ni tiam estos ĉe UK en Finnlando), kaj s-ro Fuse Kentarou gvidos la partoprenantojn per Esperanta dialogado helpe de suflorantoj.

Niaj klasoj kaj kursoj

Okazas jenaj klasoj (kutime en [KK])

*Enkonduka kurso de Esperanto

En 6 fojoj, po 3 horoj en sabato: jun. 1 - jul. 6 (sed ne en maj. 4) . gvidata de Fuse Kentarou; komencita kun 1 kursano.

***Daŭriga kurso** (post la Enkonduka), en sabato, gvidate de Doi Ĉieko.

*Regulaj Klasoj en sabato

(1) Klaso "Eseoj", por legi "Tamen ĝi moviĝas!" gvidate de Doi Hirokaz

(2) Jokohama Salono. 2 fojojn monate oni legas (de aprilo) "La Ŝtona Urbo", originala romano de Anna Löwenstein, 1 fojon – libera verkado; kaj alian fojon –tradukado laŭ sia plaĉa fonto.

*Regulaj Klasoj en merkredo

(1) Klaso "Belĉielo", por legi "Silento", tradukon de la japanlingva originalo, gvidate de Doi Ĉieko

(2) Klaso "eriko", por legi "Utila Estas Aliĝo" gvidate de Doi Ĉieko

*Neregula Klaso

(1) Klaso "Teksantoj", por legi "Kuniberto kaj Kilevamba", per la gvido de Doi Ĉieko, du fojojn monate. Noto: la klaso "Belflora" havas tiun ĉi novan nomon.

(2) "Rapida kurso", por studentino kun baza kono pri Esperanto, per la gvido de Doi Ĉieko, en la tereno de Urba Universitato de Jokohamo. unu fojon semajne.

Eseo

Iu forgesita esperantisto, Ootani Masakazu

Doi Ĉieko

Mi skribos pri Ootani Masakazu, esperantisto preskaŭ forgesita; antaŭ la Dua Mondmilito, en la 1930-aj jaroj, li estis tre konata esperantisto: lia nomo kaj liaj verkoj ofte aperis en la gazetoj “La Revuo Orienta” kaj “La Fervojisto”.

Ootani naskiĝis en 1906 en Kioto. Edukita ne sufiĉe en lernejoj, en la juna aĝo li eklaboris kiel fervojisto en Hukuĉijama en la gubernio Kioto, kaj edziĝis eble en la 20-a jaro. Kiam li eklernis Esperanton, li estis 26-jara, sed jam patro kun 4 infanoj. Li estis diligenta laboristo kaj entuziasma literatur-amanto.

Iam li eksciis pri Esperanto per radio-elsendo, kaj diris al sia edzino: “De hodiaŭ mi lernas Esperanton. Mi volas ellerni la lingvon, per kiu mi volas vastigi mian scion pri la mondo. Por lernado de Esperanto, de nun dum unu jaro mi ne legos ĵurnalon kaj gazeton, ne aŭskultos radio-elsendon, kaj uzos preskaŭ tuton de mia salajro por Esperantaj libroj. Dum unu jaro mi estos nek edzo, nek patro. Komprenu min, kaj permesu min.”

Tia konduto ŝajnas al ni freneza. Vere freneze li lernis Esperanton, eĉ dum manĝado kaj ankaŭ en necesejo, ĝis profunda nokto. Dume lia edzino vendis siajn kostumojn kaj manlaboris hejme por teni la vivon de ses familianoj. En la urbeto Hukuĉijama ne loĝis bona gvidanto de Esperanto, nek unu kamarado. Li devis memlerni per libroj.

Kvar monatojn poste li trovis la nomon de Ossaka Kenĵi en la lernolibro “Esperanto-Ŝookei”, kies aŭtoro li estis. Li estis inĝeniero ĉe la fervoja ministerio, do kolego de Ootani. Ootani tuj foliumis la adresaron de fervojistoj, kaj trovis la adreson de Ossaka. Post longa pripensado Ootani skribis novjaran karton al tiu eminenta esperantisto-inĝeniero. Kiel ĝoja estis li, kiam li ricevis la respondon de Ossaka. Li jam ne estis sola esperantisto ĉirkaŭ sia mondo, kaj li eksciis la ekziston de Japana Esperantista Ligo de Fervojistoj. Li tuj aliĝis al la ligo kaj mem fondis Esperanto-Societon en sia laborejo. Ankaŭ organon li eldonis. “Feliĉa Stelo”, tiel nomis la organon Jagi Hideo, kiu 30 jarojn poste estis prezidanto de UEA. Ootani okazigis kursojn kaj ekspoziciojn. Tiamaniere li komencis sian vivon kiel esperantisto, kaj tion

ebligis lia energio kaj klopodo kvazaŭ frenezaj, kaj tion ebligis ankaŭ varma stimulo de multaj eminentaj esperantistoj, Jagi, Ossaka kaj aliaj. “Kiel bonkoraj kaj sinceraj estas esperantistoj!” Tute kortuŝita li decidis esti esperantisto ĝis la morto.

Ĉar li estis fervojisto, li povis senpage vojaĝi en la tuta lando; do li ofte vizitis esperantistojn en aliaj urboj kaj urbetoj. Ankaŭ aliaj fervojistaj esperantistoj ofte vizitis la malgrandan urbon Hukuĉijama, kaj parolis kun Ootani ĝis malfrua nokto en kaj pri Esperanto.

Du jaroj pasis. Tiam iom post iom malvigliĝis lia societo en Hukuĉijama malgraŭ lia klopodo. Kaj restis nur tri esperantistoj tie. Kaj krome iun tagon lia tria filino mortis pro akcidento: ŝi falis en riveron akvoplenan post la paso de tajfuno. Multaj esperantistoj el Oosaka kaj Kioto venis por konsoli lin, kiu estis en la fundo de malĝojo. Post malpli ol du monatoj li ŝajnis jam vigla, kaj denove partoprenis multajn kunvenojn por labori tie laŭ la rekomendo de Takahaŝi Kunitaroo, kiun li nomis “la amata avo”. Eble en Japanio li ne povis akiri deziratan postenon pro manko de edukiteco, kaj en Koreio li povus libere labori, pli multe gajni salajron por multaj familianoj. Verŝajne tiel li pensis, kaj ĉu la morto de lia amata filino iel efikis lian decidon, mi ne scias.

Ĉiuokaze en la komenco de la jaro 1935 li ekiris al Koreio, de la haveno de Curuga. Kelkaj esperantistoj forvidis lin ĉe la haveno. Li ekiris al tiel nomata “Kontinento”, kun la firma decido, ke li neniam plu revenu hejmlanden, kaj fariĝis tute sentimentala. Sed ankaŭ en sia loĝurbo Seiŝin (Cheongjin) li komencis instrui Esperanton al siaj kolegoj, kaj fondis Esperanto-Societon.

Kelkajn monatojn poste ankaŭ liaj familianoj venis al Seiŝin kaj lia ekonomia stato iom pliboniĝis. Tamen ankaŭ en Seiŝin li perdis sian amatan filineton pro malsano.

Unu jaron poste li transloĝiĝis al Dairen (Dàlián) en Manĉurio por labori en Sudmanĉuria Fervojo. Tiutempe la kompanio de Sudmanĉuria Fervojo eldonis Esperanto-lingvan gvidfolion pri Manĉurio. La laboron faris Kakei Taroo, kiu estis tamen

specialisto de la angla lingvo. Tial post la eldono de la folio Ootani surpronis la taskon de Kakei. Finfine per Esperanto li povis vivteni. Liajn ĝojon kaj fieron ni povas facile imagi. La unua gvidfolio tuj elĉerpiĝis, kaj la kompanio planis eldoni pli ampleksan pli unikan gvidlibron. Kompreneble Ootani laboris por la libroj. Unu el ili estis nomita “Ek al Manĉoukŭo” (foto), kiu estis gvidlibro, kaj la alia estis nomita “Kiam alvenas, tiam ekveturas!”, kiu estas horaro de vagonaroj. Intertempe li parolis per radio-elsendo pri Esperanto dum 30 minutoj. Ĝia efiko estis tiel granda, ke oni preparis Esperanto-kurson per radio-elsendo.

Tiutempe en Japanio estis fondita la Patriota Ligo de Esperantistoj. La ligo celis la kunlaboron al la milito. Kaj unu el la fondintoj de la ligo estis Takahaŝi Kunitaroo, kiun Ootani alte estimis kaj amis. Kiel sin tenis Ootani al la patriota ligo? Tion ni ne povis trovi en dokumentoj. En pli frua tempo li skribis: Esperantistoj devas klopodi por Esperanto firme tenante la spiriton de patriotismo. Sed tuj post la fondiĝo de la patriota ligo, lia silentado komenciĝis en gazetoj, kaj ni trovas nur la artikolojn: “ie iu renkontis s-ron Ootani, kaj gaje interparolis en Esperanto”. Du jaroj pasis, kaj en 1939, unu el tiaj artikoloj informas, ke Ootani jam ne laboras en Sudmanĉuria Fervojo, sed laboras en la kompanio, kie laboras Jui Ĉuunoŝin.


La lasta informo pri li estis kiel jene: H. Terada renkontis s-ron Ootani, kaj diris, ke li nun estas bona sinjoro kaj patro.

Tiu s-ro Terada loĝis en Oosaka en 1984, sed mi ne povis aŭdi rekte de li, kaj pri Ootani ni ne povas demandi ankaŭ s-ron Jui, sed pri li mi povis aŭdi de lia filino, ke li mortis en 1944 en la periferio de Hooten (Fèngtiān) pro ftizo, kiam li estis 38-jara. Mi povis ekscii ankaŭ, ke li eksedziĝis, kiam li estis en Manĉurio. Verŝajne lia edzino ne povis sekvi lin, kiu sin dediĉis ne al sia edzino, sed al Esperanto.


Ĉu lia vivo estis erara aŭ prava, ni ne povas juĝi. Eble vere prava vivo ne povas ekzisti. Sed lia tuta vivo estis pasie intensa, mi pensas, kaj estas tute certe, ke tiu intenseco mallongigis lian vivon.

Kaj laste mi aldonas, ke tiu Ootani Masakazu estas la patro de s-ino Noro Masako, kiu estis unu el kursanoj de nia rondo. Ŝi eklernis Esperanton memore al sia patro forpasinta en la malproksima loko, kaj ŝi trovis lian spuron. (fino)

(el n-ro 134 de “La Tamtamo”, eldonita en 1984-02, la tekston mi iom ŝanĝis por pli bone komprenata en la nuna tempo, okaze de la forpaso de s-ino Noro Masako en 2018.)



kovrilo kaj dorskovrilo



la frontispico de la libro